## ENHAVO

Ekonomiaj teorioj pri justeco
(B.A. WICKSTRÖM) .......................... 3
Interkomprenîgo per interagoj kaj sentoj
(T. TYBLEWSKI) .......................... 17
Komunikiĝo inter bestoj
(C. STØP-BOWITZ) .......................... 33
Aŭtomata rego de oksigena fluo por novnaskitoj
(J. MILLS) .......................... 43
Sensentigo – La metodo por kuraci anksiecon
(D. TYBLEWSKA-KUNDZICZ) .......................... 53
Scienca objekto kaj metodoj de la fakdidaktiko
(J. BROCKMEYER) .......................... 59
Alkoholo kaj krimfarado
(T. CARLEVARO) .......................... 65
Kelkaj problemoj pri komunikado
(P. ANDRES) .......................... 75





# EKONOMIAJ TEORIOJ PRI JUSTECO

**Bengt-Arne Wickström***

**0. Resumo**

La artikolo kritike revuas kelkajn ekonomiajn teoriojn pri justeco. Mallongan revuon de la teorio ekonomia bonfarta kaj difinadon de la konceptoj efikeco kaj pareta plibonigo sekvas diskuto pri unuanimaj decidoj kaj sociaj kontraktoj. Poste estas pritraktate, kiel teorio de justeco kaj de redistribuado povas baziĝi sur individuaj preferoj. Variaj alproksimiĝoj al difinoj de justeco ekonomia, kiel justa distribuo kaj justa proceduro, kaj la diferencoj inter tiuj estas klarigataj.

Surbaze de la konceptoj socia kontrakto kaj procedura justeco pli ampleksa teorio konstruiĝas kaj analiziĝas. Tio estas, difininte fikcian komencan anstataŭaton, en kiu ĉiu homo en la socio posedas iujn bazajn rajtojn kaj neperfektan informon pri sia estonta pozicio en la socio, oni sin demandas, pri kiuj leĝaj kaj redistribuaj reguloj ĉiuj homoj en tia fikcia antaŭstato povas interkonsenti. Tia interkonsento nomiĝas justa socia kontrakto.

La formo de la socia kontrakto kaj la distribuoj implicitaj de tiu dependas de la supozoj pri la fikcia anstataŭato. Diri, ke la homoj en tia stato ne konus siajn estontajn laborkapablojn, signifas diri, ke ili baze ne rajtas je la enspezoj de tiuj kapabloj. Tial ekzemple oni povas konkludi, ke oni rajtas imposte redistribui la enspezojn de la socianoj. La interrilato inter la antaŭstato kaj la socia kontrakto do provizas al ni filozofian bazon por juĝi kaj taksi la redistribuajn politikojn de variaj socioj.

**1. Enkonduko**

Justeco iel signifas samecon aŭ egalecon. Homoj tamen estas denature malsamaj: ili naskiĝas kun malsamaj kapabloj kaj, evoluante, ili surbaze de malsamaj spertoj formas malsamajn gustojn aŭ preferojn. Por ebligi diskuton de

* Instituto por ekonomiko, Johano-Kepler-Universitato de Linz, A-4040 Linz-Auhof, Aŭstrujo.

distribuoj kaj komparon de distribue malsamaj statoj do necesas iel kompari bonfartstaton de malsamaj individuoj. Krome, eĉ se ni facile povus kompari tiajn bonfartstatojn, efektivigo de distribua sameco en origine neegala socio ofte signifas kostojn en formo de malpli efika uzo aŭ perdo de sociaj rimedoj. Konstruonte teorion de justeco, ni do unue devas difini la du konceptojn efikeco kaj egaleco por poste, se kontraŭas tiuj ecoj, povi pesi kaj kompari la valorojn de ambaŭ.

Unue ni diskutos efikecon. Efika uzo de la sociaj rimedoj signifas, ke nenio perdiĝas. En la dua sekcio de ĉi tiu artikolo ni plue pritraktos tiun temon kaj difinos la sur individuaj preferoj bazitan koncepton pareta efikeco. Sekcio tri enkondukas la koncepton socia kontrakto, kaj ties rilato al pareta plibonigo estas klarigata. Due necesas difini egalecon. Kiel ni jam vidis, ankaŭ tiu koncepto havas individuan aspekton. Tio estas, ni devas ĝeneraligi samecon en koncepton, kiu ankaŭ konsideras la malsamajn individuajn preferojn de la socianoj. Tia koncepto estas senenvieco. Ĝin ni pritraktos en sekcio kvar.

De la du elirpunktoj efikeco kaj egaleco ni en sekcio kvin diskutos, kiel ni okaze de teoria aŭ praktika maleblo de efika senenviecstato povas pli ĝeneraligi la koncepton senenvieco al egalrajteco aŭ procedura justeco. Fine en la sesa sekcio egalrajteco kombiniĝas kun la koncepto socia kontrakto en pli ampleksa teorio pri justa socia kontrakto.

**2. Pareta plibonigo kaj efikeco**

La tiel nomata novklasika ekonomia teorio pri bonfarto ĉefe estas teorio pri efika asigno de la varoj kaj aliaj rimedoj al la socianoj. Per tiu teorio, aliflanke, principe neniel eblas taksi gradon da justeco de la distribuo aŭ redistribuado de la riĉaĵoj de la ekonomio inter la homoj.

La limigado de la bonfartoteorio al efiko kaj la malfacilo diskuti justecon sur ĝia bazo devenas de la idealo, ke tia teorio nur baziĝu sur individuaj preferoj de la homoj. La bonfarton de iu ajn homo taksu nur tiu homo. La uzata mezurilo de bonfarto socia, *pareta*[1] efikeco, do rilatas nur al individuaj preferoj: unu stato de la socio estas parete pli bona ol alia, se almenaŭ unu homo ĝin preferas kaj neniu trovas la alian pli bona. Libervolaj ŝanĝoj laŭdifine parete plibonigas la bonfarton de la en la interŝanĝoj partoprenantaj homoj. Oni ja ne libervole konsentas en perdo. Do, ĉiesvoĉa decido estigas paretan





plibonigon. Tiun econ de ĉiesvoĉregulo ni utiligos difinante socian kontrakton en la sekvanta sekcio.

Do, se du homoj, sinjorino A kaj sinjoro B, sin vivtenas sole per manĝado de bakaĵo kaj devas dividi kukon inter si, ĉiuj manieroj dividi la kukon, kiuj konservas la tutan kvanton da bakaĵo, estas parete efikaj. Ĉar A ŝatas bakaĵon, A deziras kiel eble plej multe, kaj ĉar ankaŭ B ŝatas manĝi kukon, B same volas kiel eble plej grandan parton. La preferoj de la du kukmanĝantoj estas rekte kontraŭaj. Ĉar la teorio sole baziĝas sur tiuj iliaj individuaj preferoj, maleblas komparo de distribue malsamaj dividoj de la kuko. Se A ricevas la tutan kukon kaj B neniom, aŭ se ili ambaŭ ricevas po duonon de la kuko, estas el pareta efikecvidpunkto samvalore.

Okaze de pli ol unu varo kaj de homoj kun malsamaj preferoj la problemo estas iom pli malfacila. En pareta bonfartoanalizo oni nun penas eltrovi, kiu povas plej efike uzi aŭ uzigi rimedojn. Ĉar ekzistas pli ol unu varo, interesas la valorado de ĉiu varo kompare alian. Tia valorado esprimeblas helpe de mona valoro. Mono tiel iĝas komuna mezurilo. Se paroli pri ordinaraj inidividue konsumataj varoj, kiel pomoj aŭ bananoj, tio signifas, ke ilin konsumu tiu, kiu por ili volas (kaj povas) plej multe pagi. Ekzemple, ni supozu, ke mi volas pagi tri monerojn por unu banano kaj vi nur du monerojn por la sama banano. Nu, se oni donus bananon al vi, kaj se vi tuj manĝus ĝin, tio ne estus bona asigno, ĉar ni povus profite por ambaŭ interŝanĝi inter ni bananon por moneroj. Vi donus al mi la bananon kaj mi donus al vi ekzemple du monerojn kaj duonan. Tiel vi gajnus valoron de duona monero kaj ankaŭ mi same profitus. Ambaŭ gajnus kaj neniu perdus, ni do atingus parete pli efikan socian staton.

Se ĉiuj havas la saman aĉetpovon, efikeco certe ne estas riproĉinda el justecvidpunkto. Se mi ŝatas bananojn kaj vi pomojn, mi pretas pagi pli por banano kaj malpli por pomo ol vi. Sed tiam ankaŭ estas preferinde, ke vi havas pli da pomoj ol mi kaj ke mi havas pli da bananoj ol vi. Normale tamen ne ĉiuj individuoj havas la saman aĉetpovon. Se ekzistas kaj riĉuloj kaj malriĉuloj en la socio, riĉulo manĝas kaj pli da bananoj kaj pli do pomoj ol malriĉulo. En la teorio pri bonfarto ne demandiĝas, ĉu riĉulo rajtas je sia granda aĉetpovo. Tamen, se iel maleblas ŝanĝi la distribuon de aĉetpovo, estas mal-

facile argumenti, ke pareta efikeco ne restu dezirinda. Ĉu ne estas preferinda al antaŭstato nova stato, en kiu almenaŭ iuj plibonfartas kaj neniu malplibonfartas?

La koncepto pareta efikeco kompreneble ne limiĝas nur al situacioj kun individue konsumataj varoj. Ĝi funkcias egale bone, kiam la bonfarto (aŭ malbonfarto) de iu homo parte (aŭ tute) rezultas pro agado de alia homo, aŭ kiam la konsumado estas kolektiva. La unuan situacion ni havas ekzemple ĉe fabriko, kiu malpurigas la medion, aŭ ĉe danĝere veturanta aŭtomobilisto; la duan ekzemple ĉe radioelsendoj.

Kiel ekzemplon de la unua okazo, oni konsideru la situacion, kiam mi deziras rekolorigi mian ĝis nun blankan domon purpura, kaj ĉiuj miaj najbaroj preferas, ke ĝi restu blanka, kiaj estas ĉiuj aliaj domoj en la ĉirkaŭaĵo. Se oni rajtas libere elekti la koloron de sia domo, ni ĉiuj eble povas plibonigi nian situacion. Specife, se mi taksas mian rajton havi purpuran anstataŭ havi blankan domon je kvincent moneroj, kaj se la najbaroj taksas la restadon de la ĝisnuna situacio je sepcent moneroj, ili povus aĉeti la rajton je purpura domkoloro de mi por sescent moneroj. Ni ĉiuj gajnus valoron de cent moneroj pro tiu interŝanĝo: mi ricevus sescent monerojn kaj fordonus la rajton havi purpuran domon, kiu por mi havas valoron de kvincent moneroj; la najbaroj fordonus sescent monerojn kaj gajnus la restadon de (laŭ ili) belaspekta ĉirkaŭaĵo, kion ili taksas je sepcent moneroj.

La efikecplibonigon oni en tiu ĉi okazo ankaŭ povus havigi per malpermeso ŝanĝi la domkoloron sen interkonsento de ĉiuj najbaroj. La du manieroj havigi plibonigon nur malsamas distribue. En la unua okazo mi posedas rajton elekti la domkoloron, kiun rajton la najbaroj devas aĉeti de mi, se ili volas malhelpi la rekolorigon; en la dua la najbaroj posedas rajton malebligi rekolorigon, kiun ili eventuale povus vendi al mi. Do, en la unua okazo mi estas pli riĉa ol en la dua kaj la najbaroj malpli riĉaj. Laŭ la efikeckriterio la du statoj estas egalvaloraj, kvankam ili estas distribue malsamaj.

### 3. Unuanimaj decidoj kaj socia kontrakto

Socia kontrakto simple estas ĉiesvoĉa interkonsento pri devigaj reguloj koncerne decidojn pri la uzo de sociaj rimedoj.[2] Imagu decidon en vilaĝo pri nova vojo de la vilaĝo al proksima urbo. Oni devas decidi, kie kaj kiel konstrui la vojon kaj kiel pagi por ĝi. La pagovolo kaj la deziroj de la vilaĝanoj certe varias. Kosmopolita posedanto de granda aŭto eble deziras grandan aŭtoŝoseon kaj estas preparita multe pagi por ĝi, dum piediranta malamanto de la urbo devas esti pagata por sia konsento. Se ĉiuj vilaĝanoj komune kaj ĉiesvoĉe decidas la aferon, eble oni konstruos la vojon, kaj tiuokaze neniu perdos kompare la antaŭstaton. Ĉar la preferoj malsimilas, la diskuto pri la decido tamen bezonas multan tempon, kiun oni povus uzi pli profitdone alimaniere. La decido do kostas iom.

Por malpliigi tiajn decidkostojn la vilaĝanoj kunvenas kaj unuanime decidas pri novaj reguloj por decidi aferojn kiel vojkonstruadon. Tia kunveno rezultigas anstataŭ la ĉiesvoĉregulo regulon postulantan pli malgrandan plimulton, ekzemple 60%, por efektivigi decidon. Tial oni gajnas per malpli grandaj decidkostoj, ĉar estos pli facile trovi proponojn, kiujn subtenas 60% de la vilaĝanoj, ol unuanime subtenatajn proponojn. Tamen oni ankaŭ perdas, ĉar iuj decidoj estos malfavoraj al iuj vilaĝanoj. Fine, kio gravas al unuopa vilaĝano, estas ĉu li averaĝe gajnos aŭ perdos. En la priregula kunveno estas aprobitaj tiaj reguloj, ke averaĝe ĉiuj antaŭvidas gajnojn. Tia regularo estas socia kontrakto. Por ke tia socia kontrakto funkciu, kompreneble necesas, ke ĝi estu deviga. Por la rajto ŝirmiĝi sub la protekto de la socia kontrakto, oni ankaŭ devas akcepti malfavorajn unuopajn decidojn.

Apliko de tiu modelo estas la teorio pri elekto de konstitucio.[3] Demandiĝas, kiujn regulojn pri la aferoj de tuta nacio aprobus konstitucia kunveno. Ĉar tia kunveno decidas regulojn por venontaj generacioj, ĝiaj partoprenantoj almenaŭ parte sidiĝas en pozicio de senpartia decidanto. Tiel ilia situacio similas al pozicio malantaŭ necertecvualo, kion ni difinos kaj pritraktos en sekcio ses. Pere de tiu teorio pri elekto de konstitucio oni povas analizi demandojn kiel la jenan: ĉu bezoniĝas malsamaj reguloj por malsamaj decidoj.

La formo de socia kontrakto multe dependas de la antaŭstato. Konsideru ree la problemon pri la kolorigo de mia domo. Se la antaŭstato estas, ke mi rajtas libere elekti la koloron de mia domo, socia kontrakto signifus kompenson al mi por malpermeso. Male, se la antaŭstato estas, ke la ĝisnuna situacio restu, socia kontrakto postulus, ke mi pagu por la rajto rekolorigi la domon. Rajtoj

en la antaŭstato nomiĝas bazaj rajtoj. En diskuto de justeco nun estiĝas demando, kiuj rajtoj estu bazaj.

**4. Egaleco kaj senenvieco**

De diskuto pri efikeco ni nun turniĝu al egaleco, la dua baza ŝtono de nia konstruaĵo. Egaleco iel signifas, ke ĉiu havu la saman kvanton de ĉio. Kiel ni tamen konstatis, homoj ofte malsamas, iuj ekzemple ŝatas bananojn, aliaj pomojn. Estas facile ĝeneraligi la koncepton egaleco al situacioj kun malsamaj preferoj. Tia pli ĝenerala koncepto estas senenvieco.[4] Socia stato estas senenvieca, se neniu en la socio volas esti "en ŝuoj de aliulo". Tio ne signifas, ke ĉiuj estu samaj aŭ havu la identajn posedaĵojn. Ĝi simple signifas, ke neniu enviu la socian pozicion de alia homo. Egaleca stato komprenéble estas senenvieca, sed senenvieca stato ne nepre egalecas.

Se ekzistus egalecstato en socio, kie la homoj posedas malsimilajn preferojn, tia stato pere de merkato parete plibonigeblus en senenviecan staton. Ekzemple, se ĉiuj homoj en la ekonomio havas po saman kvanton de ĉiuj varoj kaj povas libervole interŝanĝi (vendi kaj aĉeti) tiujn inter si je konataj kaj por ĉiu homo samaj prezoj, ili okazigos senenviecan kaj parete pli bonan staton. Ĉar la interŝanĝo estas libervola, ĉiu preferas sian novan situacion al la malnova; do paretoplibonigo. Ĉar por ĉiu homo validas la samaj prezoj, ĉiu povas havigi al si la samajn varojn, kiujn havas iu ajn alia homo; do senenvieco.

Se homoj povas libere elekti inter diversaj ebloj, estiĝos senenvieca stato, ĉar ĉiu elektos la por si pli bonan eblon. En multaj landoj oni penas havigi 'justajn' vivkondiĉojn al individuoj sendepende de iliaj loĝlokoj. Se povas libere transloĝiĝi ĉiuj, la sukceso de tia politiko simple observeblas per la migrado de unu regiono al alia. Se migras homoj de la kamparo en la urbojn, oni povas konkludi, ke multaj kamparanoj preferas la vivon de urbano, kaj ke la urbanoj ankaŭ preferas la vivon en la urbo. Do, ekzistas envieca stato. Urbanoj spertas pli bonan staton ol kamparanoj. Senenvieco estiĝos, kiam malaperos la neta migrado al la urboj. Tia fenomeno ofte nomiĝas "balotado per la piedoj"[5]

Tamen ofte maleblas perpieda balotado pro kialoj praktikaj aŭ teoriaj. Tre altaj transloĝiĝkostoj ekzemple ofte por multaj homoj praktike malebligas





ŝanĝon de ilia vivsituacio. Ofte oni estas spertulo de iu metio aŭ profesio, kiun en sia nova situacio oni ne povas utiligi. Tial perpieda balotado ĉefe observiĝas ĉe junaj homoj, kiujn ne jam ligas multjara sperto al unu profesio. Alia, pli grava, problemo estas la maleblo eĉ teorie interŝanĝi la vivsituacion kun alia homo. Ekzemple, mi volus esti operokantisto, sed mankas al mi grava antaŭnecesaĵo: la voĉo. Ankaŭ maleblas havigi al mi la voĉon de ekzemple Placido Domingo. Atingo de senenvieca stato per libervola ŝanĝo de vivsituacio do ne eblas.

Ekzistas tamen ankaŭ tiuokaze senenvieca stato. Oni simple kompensu min per aliaj rimedoj tiel, ke mi preferas mian vivsituacion al tiu de Domingo. Nun eble estiĝas nova problemo. Ĉar min oni devas multe kompensi, ke mi ne enviu Domingon, eble Domingo preferus nun mian novan vivsituacion al sia. Senenvieco signifas, ke li rajtu elekti ankaŭ mian. La rezulto estus senenvieca socio, sed ankaŭ socio, en kiu ne kantus sed prelegus Domingo. La maleblo aŭskulti la Otelon de Domingo estus ega kosto por mi. Mi vole pagus al li mian grandan kompenson, por ke li kantu. Tiel ni revenus al la origina, ne-senenvieca, stato. Tiu tamen estas parete pli bona ol la senenvieca stato. Senenvieco kaj efikeco ĉi-okaze kontraŭas.

Tiu kontraŭo inter egaleco kaj efikeco devenas de la fakto, ke ies laborkapabloj kaj aliaj lertoj ne estas transdoneblaj al aliulo. Tio signifas, ke redistribuado ĉi-okaze necesigas kostojn en formo de malpli efika uzo de sociaj rimedoj. Tiuj kostoj estas nedisigebla elemento de nia teorio, kiel ni vidis en la supra ekzemplo. Krome ankaŭ ekzistas praktikaj kostoj, devenantaj el la ekonomia kaj politika sistemo, kiu realigus redistribuadon. Tiuj estas rektaj administraj kostoj kaj nerektaj efikecperdoj necesigitaj pro la bezono igi relative simpla la sistemon de redistribuado.

Kiel ilustraĵon de la unua tipo de kosto ni konsideru ekzemplon. Por dividi la antaŭe menciitan kukon ni devas havigi al ni aron da burokratoj por aprobi la kvaliton de la manĝaĵo, kontroli la akrecon de la tranĉilo, funkciigi la tranĉilon kaj mezuri la kukpartojn. Tiuj ĉiuj devas esti pagataj pro sia laboro. Krome en realo la ricevantoj de la dividita kuko volas, aŭ eĉ devas, protekti siajn interesojn kaj tial formas premgrupojn por praktiki "koridoran politikon", tiel penantajn havigi al la anoj de sia grupo kiel eble plej grandan par-

ton de la kuko. La agado de la premgrupoj komprenеble estas pagenda per la bakaĵo. Tial granda parto de la kuko malaperas de ni pro la administrado de la dividado kaj redistribuado.

La dua tipo de kosto estiĝas pro la praktika maleblo trovi perfektan individuan sistemon de redistribuado. Redistribuo ofte signifas redistribuon per impostoj. Sed impostoj bezonas bazon, kaj se la impostpagantoj responde al la imposto povas ŝanĝi la impostbazon, tio estas fonto de neefikeco. En Bergen, Norvegujo, ekzemple la grandeco de la domgabloj fronte al la strato iam estis bazo de la imposto de domposedanto. Rezultis, ke ĉiuj domoj de tiu tempo estas konstruitaj kiel eble mallarĝaj strafronte kaj tre longaj malantaŭen al la korto. El loĝvidpunkto tiaj dimensioj ne nepre estas la plej bonaj. Ni do konkludu, ke senenviecstato estas ebla, sed ofte ne estas efika. Ni tial devas pesi la deziron pri egaleco kontraŭ la deziro pri efikeco. Alivorte, ni devas elekti inter granda, sed neegale dividita, kuko kaj al la socianoj egale disdonita, tamen malgranda kuko. Manierojn analizi tiun problemon ni pritraktos en la sekvantaj sekcioj.

**5. Justa proceduro kaj egalrajteco**

Ĝis nun ni nur pritraktis problemojn koncerne realigitajn distribuojn. Ni diskutis, kiel el egalecvidpunkto dezirinda distribuo de riĉaĵoj aspektu. Ni tamen nenion diris pri la reguloj kaj proceduroj, kiujn alfrontas ĉiuj socianoj, kaj el kiuj ofte rezultas la observebla kaj realgita distribuo de enspezoj kaj aliaj rimedoj. Estintaj travivaĵoj, kiel eduko, la socia pozicio de gepatroj ktp., formas la sorton de la individuo, kaj tial ekzemple la eduka sistemo multe gravas kiel determinilo de realigita distribuo de aĉetpovo.

Ni pritraktu simplan ekzemplon. Konsideru ree la dividotan kukon. Eble la dividadkostoj egalas al la valoro de la kuko. Tiuokaze, se la kuko estas dividota inter du homoj, A kaj B, restas tri eblaj dividmanieroj: A ricevu la tutan kukon, B ricevu la tutan kukon aŭ ambaŭ ricevu neniom:

| | Kazo | | |
|---|---|---|---|
| | **I** | **II** | **III** |
| **A** | 1 | 0 | 0 |
| **B** | 0 | 1 | 0 |





Nur la tria maniero estas senenvia, sed la du aliaj estas parete pli bonaj ol la tria. Se ni devas elekti inter tiuj tri manieroj dividi la kukon, ni povas transpreni la egalecdeziron al la procedura nivelo. Anstataŭ egaleco ni parolu pri egalrajteco. Tio estas, ni devas trovi proceduron, kiu rezultigas la elekton de unu el la du unuaj dividmanieroj kaj kiu iel donas la saman eblon al ambaŭ homoj. Lotumado estas tia proceduro. Se la kuko estas lotumota kaj ambaŭ homoj havas la saman ŝancon gajni ĝin, la proceduro estas egalrajteca. Oni ankaŭ diras, ke la dividado estas *de-antaŭe (apriore)* egaleca sed *de-poste (aposteriore)* ne-egaleca.

La leĝo estas ekzemplo de de-antaŭa egaleca sistemo. Ĉiuj ŝtelistoj riskas la saman punon, kaj, se ili estas same spertaj, la probablo esti punita estas por ĉiu la sama. Do, la sistemo estas egalrajteca. Ĉar ne ĉiuj ŝtelistoj estas arestitaj kaj punitaj, la sistemo tamen ne estas de-poste egaleca. Por pligrandigi la gradon de realgita egaleco do bezoniĝas pli severa leĝobeigado, kiu eble kostas pli ol la socia gajno pro la malpli-grandigo de ŝtelado, kiun ĝi kaŭzus. Ankoraŭfoje estigas netajn kostojn pli da de-posta egaleco.

Alia ekzemplo de egalrajteco estas publika edukado. Tiu forigas la gravecon de gepatraj enspezoj kiel determinilon de la eduka nivelo de infanoj. Tiel la vivkondiĉoj de homo okazigas pli liaj propraj kapabloj ol la pozicio de liaj gepatroj.

**6. Necertecvualo kaj justa socia kontrakto**

Ni nun kombinu la du konceptojn socia kontrakto kaj egalrajteco, tiel difinante justan socian kontrakton pere de fikcia antaŭstato kaj "necertecvualo". Tio estas, ni supozas, ke ĉiuj socianoj estus metitaj en situacion, kie ili ne scias, kiun lokon ili okupos en la reala mondo; ili troviĝus malantaŭ necertecvualo.[6] De tie ili negocus socian kontrakton kaj tra ĝi distribuon de bonfarto. Se ili ne scius siajn realigotajn kapablojn, ili trovus ĉiujn sociajn poziciojn en la realigota socio egale probablaj, kaj la realigo de la socio estus egalrajteca proceduro. Sed diri, ke ili tute ne scias siajn kapablojn, signifas diri, ke ili malantaŭ la necertecvualo havas la samajn bazajn rajtojn. Aliflanke, se ili ekzemple scius siajn laborkapablojn, tio estas, se laborkapabloj estus bazaj rajtoj en la malantaŭvuala negoco de socia kontrakto, la proba-

blo, ke ili troviĝus en iu ajn specifa socia pozicio, estus malsama por malsame laborkapablaj homoj.
Alivorte, la proceduro estas egalrajteca por homoj kun samaj bazaj rajtoj. Do, la asigno de bazaj rajtoj malantaŭ la necertecvualo determinas kialon, pro kiu socio akceptas ne-egalrajtecon en la fikcia proceduro. Tia asigno tiel ankaŭ determinas unu kialon por ne-egaleco en la realigita socio. Alia kialo por tia ne-egaleco kompreneble estas la jam pritraktita efikecperdo.
Ni penu klarigi tion per ekzemplo. En socio de kvin kukbakantoj kaj -manĝantoj du havas grandajn laborkapablojn kaj tri malgrandajn. Sen redistribuado la distribuo de manĝaĵoj estas dek du kaj kvin kukoj al la grandkapablaj homoj kaj ok, tri kaj unu kuko al la malgrandkapablaj. Tio estas, laborkapabloj nur parte determinas la enspezojn. Aliaj faktoroj, kiel loĝloko aŭ hazardo, ankaŭ gravas. Per redistribuado eblas realigi la sekvantajn distribuojn:

**Distribuo**

| | 0 | I | II | III | IV | V | VI | VII | VIII | IX |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| A | 20 | 19 | 17 | 16 | 15 | 14 | 12 | 10 | 6 | 4 |
| B | 10 | 11 | 12 | 11 | 10 | 9 | 9 | 8 | 6 | 4 |
| C | 15 | 14 | 14 | 13 | 13 | 12 | 10 | 9 | 6 | 4 |
| Ĉ | 7 | 7 | 7 | 8 | 9 | 9 | 9 | 8 | 6 | 4 |
| D | 1 | 2 | 3 | 5 | 6 | 7 | 8 | 7 | 5 | 4 |
| **Sumo** | 53 | 53 | 53 | 53 | 53 | 51 | 48 | 42 | 29 | 20 |

A kaj B estas pozicioj de grandkapablaj homoj kaj C, Ĉ kaj D de malgrandkapablaj. Diri, ke oni ne baze rajtas je siaj laborkapabloj, signifas, ke oni malantaŭ la vualo ne scias, kiuj estas realigotaj, kaj tial trovas ĉiujn kvin poziciojn egale probablaj. Tio estas, oni elektas unu el la dek ĉi-supraj distribuoj, kiel oni elektas loterion. La mezvaloro de distribuo fariĝas la averaĝa valoro aŭ ekspekto de rilata loterio. Kiu malŝatas riskon, ne elektas O, I, II aŭ III, ĉar ili estas pli riksaj ol IV, kiu havas la saman ekspekton. Ankaŭ ne elektiĝas VII, VIII aŭ IX, ĉar ili estas parete malpli bonaj ol la aliaj. Depende de sia riskmalinklino la homoj en la fikcia antaŭstato elektas kiel





justan socian kontrakton unu el IV, V kaj VI. Kiu estas tre malinklina al risko, preferas distribuon VI, kaj por homo, kiu preskaŭ ne malinklinas, la preferata socia kontrakto estas IV. Ni ree trovas, ke la efikecperdo, kiel ni jam vidis en alia ekzemplo, nepre elbaras la tute egalecan distribuon IX.
Nu, se en la fikcia antaŭstato ĉiuj konas siajn realigotajn laborkapablojn, du el la homoj malantaŭ la vualo scias, ke ili estos aŭ en pozicio A aŭ en B, kaj la aliaj tri, ke ili estos en C, Ĉ aŭ D. La du unuaj, se ili malŝatas riskon, ne elektas distribuon O, ĉar loterio I havas la saman ekspekton kaj malpli da risko. Ili ankaŭ ne elektas distribuojn III, IV, V, VI, VII, VIII aŭ IX, ĉar tiuj estas parete malpli bonaj ol II. Do ili elektas aŭ distribuon I aŭ II. La tri malpli laborkapablaj homoj por la samaj kialoj volas elekti aŭ distribuon V aŭ VI. Ili tamen preferas distribuon III al II, II al I kaj I al 0 (III rilate al II, kiel II rilate al I, estas malpli riska kaj havas pli grandan mezvaloron, kaj I estas malpli riska ol 0 kun la sama ekspekto). Do, la preferojn de la grandkapablaj homoj por I aŭ II kompare al 0 subtenas ankaŭ la tri malpli kapablaj. Aliflanke, la plej kapablaj homoj certe kontraŭstaras plian gradon da redistribuado ol implicita en distribuo III, ĉar porm ili la distribuoj IV, V, VI, VII, VIII kaj IX estas parete malpli bonaj ol 0. Do, la solaj eble unuanime al distribuo 0 preferataj distribuoj kaj tial la solaj eblaj justaj sociaj kontraktoj estas I, II kaj III.
La supozo, ke oni baze rajtas je siaj laborkapabloj, signifas pli malgrandan gradon da redistribuado (I, II aŭ III) ol en la okazo, ke oni ne rajtas je la laborkapabloj (IV, V aŭ VI). Ekzistas do rilato inter la realigita distribuo kaj la supozoj pri la fikcia antaŭstato. La teorio pri justa socia kontrakto tiel provizas al ni filozofian bazon por taksi redistribuajn politikojn.

**7. Literaturo**

Buchanan, J.M. (1975).
*The limits of liberty. Between anarchy and Leviathan.*
Chicago: University of Chicago Press.
Foley, D. (1967).
"Resource allocation in the public sector."
*Yale Economic Essays* 7: 73-76.

Harsanyi, J.C. (1953).
"Cardinal utility in welfare economics and in the theory of risk-taking." *Journal of Political Economy* 61: 434-435.

Harsanyi, J.C. (1955).
"Cardinal welfare, individualistic ethics, and interpersonal comparisons of utility." *Journal of Political Economy* 63: 309-321.

Kant, I. (1797).
*Metaphysische Anfangsgründe der Rechtslehre.*
Königsberg: Friedrich Nicolovius.

Kolm, S.-Ch. (1985).
*Le contrat social libéral. Philosophie et pratique du libéralisme.*
Paris: Presse Universitaire de France.

Kolm, S.-Ch. (1971).
*Justice et équité.*
Paris: Editions de la Recherche Scientifique.

Nozick (1974).
*Anarchy, state, and utopia.*
New York: Basic Books.

Pareto, V. (1909).
*Manuel d'économie politique.*
Paris: Girard & Brière.

Pazner, E. (1976).
"Recent thinking on economic justice."
*Journal of Peace Science* 2: 143-153.

Platono (ĉ. 395 a.k.e.).
*Κρίτων.* Vidu ekzemple eldonon de J. Adam (1891, represo 1980), Cambridge: Cambridge University Press; aŭ Esperantan tradukon de A. Goodheir (1981), Glasgow: eldonejo Kardo.

Rawls, J. (1971).
*A theory of justice.*
Cambridge: Harvard University Press.





Rousseau, J.J. (1762).
*Du contrat social; ou principes du droit politique.*
Amsterdam: Marc Michel Rey.

Varian, H. (1975).
"Distributive justice, welfare economics and the theory of fairness."
*Philosophy and Public Affairs* 4: 223-247.

Varian, H. (1980).
"Redistributive taxation as social insurance."
*Journal of Public Economics* 14: 49-68.

Vickrey, W. (1945).
"Measuring marginal utility by reactions to risk."
*Econometrica* 13: 319-333.

## 8. Notoj

---

* Prelego preparita por la 40a sesio de la Internacia Kongresa Universitato en Varsovio julion 1987.
Mi dankas al sinjorino E. Matland kaj al la ĉefredaktoro de tiu ĉi revuo, d-ro J. Kavka, kiuj multe helpis al mi plibonigi la lingvaĵon.

1. Nomita pro itala ekonomikisto V. Pareto (1848-1923); vidu Pareton (1909).
2. La ideo pri socia kontrakto devenas de Platono (ĉ. 395 a.k.e.) kaj aliaj helenaj filozofoj, kaj ĝin pritraktis ankaŭ multaj aliaj grandaj filozofoj, ekzemple Rousseau (1762) kaj Kant (1797). En nia tempo tian koncepton uzis ekzemple Buchanan kaj Tullock (1962), Rawls (1971), Nozick (1974), Buchanan (1975) kaj Kolm (1985).
3. Vidu la librojn de Buchanan kaj Tullock (1962) aŭ Buchanan (1975). Uzante similajn soci-kontraktajn argumentojn, Varian (1980) pritraktas redistribuadon en ne-certa mondo kiel socian asekuron. Homoj, kiuj ne-certas pri siaj estontaj enspezoj, libervole konsentas pri redistribuado de tiuj enspezoj por malpliigi riskon. Komparu al tio la teorion pri justa socia kontrakto en sekcio ses.
4. Bonan revuon de tiu teorio skribis Pazner (1976). La origina ideo pri ekonomia apliko de la ideo troviĝas en Foley (1967). Vidu ankaŭ Kolm-on (1971) kaj Varian-on (1975).
5. En Platono (ĉ. 395 a.k.e.) Sokrato uzas similan argumenton por klarigi al Kritono sian respekton por la atena leĝo. Li diras, ke li ja iam libervole elektis Atenon kiel loĝlokon. Li perpiede balotis favore al la socia kontrakto atena.
6. Grava traktaĵo de la teorio de justa socia kontrakto estas tiu de Rawls (1971).
La novaj utilismaj teorioj de ekzemple Vickrey (1945) kaj Harsanyi (1953) kaj (1955) ankaŭ similas al tiu ĉi teorio. Utilismo kiel kriterio de ekonomia justeco signifas, ke la plej bona socia stato estas tia, ke en ĝi maksimumiĝas la sumo de la utiloj de ĉiuj socianoj. Tio estas, oni supo-

zas, ke la bonfarto de ĉiu homo reprezentiĝas per utila indekso. La sumo de tiuj utiloj do estas la sumo de socia bonfarto.
Grava problemo kompreneble estas, ke ĝenerale tiaj utiloj ne mezureblas, sed se ĉiuj homoj same taksus siajn utilojn, se ili povus elekti distribuojn kiel loteriojn (vidu supren) kaj se ili penus maksimumigi sian ekspektan utilon, tio egalas al maksimumigado de la sumo de utiloj individuaj en la reala distribuo, ĉar ekspekto ja estas sumo. Harsanyi (1955) montris, ke tia kriterio estas la unika, kiu kontentigas aron da tre ĝeneralaj aksiomoj.


### Økonomiske teoriar for rettferd

Artikkelen gjev ei oversyn over økonomisk teori for rettferd.
Med utgangspunkt i ei opphaveleg stode vert sambandet mellom effektivitet og samrøystes avgjerder drøfta. Dette tener som bakgrunn for definisjonen av omgrepi samfunnskontrakt og grunnleggjande rettar. På liknande måte utvidar ein omgrepet likskap til sjalusifridom og rettferdig prosedyre. På grunlag av desse generaliseringane av effektivitet og likskap vert omgrepet rettferdig samfunnskontrakt definert.
Ein syner til slutt kva ulike føresetnader om dei grunnleggjande rettar som den rettferdige samfunnskontrakten byggjer på, har å seia for korleis ei rettferdig fordeling av resurssane i samfunnet ser ut.






# INTERKOMPRENIĜO PER INTERAGOJ KAJ SENTOJ

**Tyburcjusz Tybłewski***

## 1. Enkonduko

Koni la homa psiĥon ŝajnas necesa al tiuj, kiuj relative ofte interagas en interpersonaj kontaktoj. Ĉiu el la kontaktoj sperteble valoriĝas, se iliaj partoprenantoj ne ignoras la leĝojn malkovritajn per psiĥologio.
Nuntempaj socipsiĥologoj prilaboris la sistemon alpropriĝadi gravajn verojn pri **kondutoj** kaj **afekcioj** dum kaj per t.n. **sentivigaj ekzercoj.** Proksimigi tiujn verojn, malgraŭ konsciata malfacileco (konfirmata fare de partoprenantoj), kaj raporti pri propraj esploroj (ankaŭ kun esperantistoj) estas celo de la suba prezento, kiu eligas la plej koncernan parton el la pli vasta materialo *(TYBLEWSKI 1984).*

## 2. Kio estas la sentivigaj ekzercoj?

Inter la specialistoj estas uzataj paralelaj ĝiaj nomoj: *"interpersona trejnado", "trejnado de sentiveco"* k.a., depende de la nuanca enhavo aŭ de la loka skolo.
Renkontiĝante kun aliaj personoj en elektita loko, garantianta trankvilon kaj oportunon, la partoprenantoj akiras eblecon doni kaj ricevi laŭtempe objektivigatan informadon pri si kaj pri la aliaj laŭ la principo: ĉiu al ĉiu kaj de ĉiu.
De la plej fundamentaj informoj ili transiras al la pli kaj pli komplikaj, ampleksante pli kaj pli profundajn tavolojn de la konscio; ili ankaŭ travivas pli kaj pli intensajn emociojn aŭ afekciojn, kaŭzitajn de eldiroj kaj kondutoj de aliaj personoj. La spertoj, kiujn ili akiras, kondukas al **memperfektiĝo** — pli efika ol iu ajn, atingata per stereotipaj metodoj. La partoprenanto lernas pri si mem kaj pri rilatoj al la aliaj, rekonante:
- kiel oni perceptas lin (ŝin),

* D-ro docento de mediplanado en AIS; Bartka Zwycięzcy 11/1, PL-58-500 Jełenia Góra.